

La novelaro de Lusin
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 618, 1975.08.13 & 16

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dank'al la aktiveco de la pekina Fremdlingva Eldonejo vi povas akiri sub formo de plaĉa libro ilustrita la plenan kolekton de la noveloj de la ĉina verkisto **Lusin**. Temas pri volumo preskaŭ kvincent-paĝa, kies esperantigo, laŭ diroj de kompetentuloj, tre fidelas al la originalaĵo. Por ke vi ricevu ideon pri la flueco de tiu ĉi traduko, ni legos al vi hodiaŭ erojn el la unua novelo titolita *La taglibro de frenezulo*.

A.- La skribinto de la notoj, kiujn ni citos, estis malsanulo, kiu kredis, ke la familianoj kaj vilaĝanoj lin volis manĝi. Pro tio li vivis en konstanta timo kaj vidis ĉe la aliaj nur malnoblajn intencojn. Jen ni eklegas fragmentojn el tiu novelo de Lusin :

Cl.- *Ĉar mi neniel povis endormiĝi, do mi atente legadis ĝis noktomezo kaj trovis finfine, ke inter strekoj de la ideografiaĵoj sur la tuta libro ĉie svarmas la vortoj **hommanĝo**, **hommanĝo** ! [...]* Oni volas min manĝi, ĉar ankaŭ mi estas homo !

A.- *Matene mi sidis kviete dum momento. Ĉen Lau-Vu alportis fanon*

Cl.- Lau la glosaro **fano** estas la plej kutima manĝaĵo en Ĉinio el kuiritaj senŝeligitaj grajnoj de greno, precipe rizo.

A.- *Ĉen Lau-Vu alportis fanon kun du bovloj da kunmanĝaĵoj, unu : legomaĵo, la alia: vaporumita fiŝo. La okuloj de la fiŝo estis blankaj kaj aspektis tute malmolaj. Ĝia buŝo larĝe gapis. Entute ĝi donas saman impreson, kiel la hommanĝuloj. Mi gustumis ĝin. Ĝia naŭza gelateneco impresis tiel, ke oni ne povis distingi, ĉu tio estas fiŝo aŭ homa karno. Nu, kion fari ? Mi elvomis ĉion, kaj elverŝis mian tutan stomakon. [...]*

Cl.- *Mi restis senmova, observante kiel do ili aranĝas ĉion kontraŭ mi. Mi jam bone komprenas, ke ili neniel lasos min libera. Trafite ! Jen mia frato envenis tre malrapide, alkondukante maljunulon. Tiu klinis sian sovaĝam rigardon al la tero kaj nur ŝtele strabis al mi el sub la okulvitroj, ŝajne timante, ke mi malkovros lian celon. Intertempe mia frato alparolis min :*

A.- *Videble vi fartas hodiaŭ pli bone.*

Cl.- *Jes, mi respondis.*

A.- *Mi invitis doktoron He por konsulti pri via malsano.*

Cl.- *Bone, mi diris.*

Sed reale mi jam divenis, ke la maljunulo estas nur maskita ekzekutisto. Li mezuros la grasecon de mia korpo, pretendante palpe kontroli la pulson! Por tiu laboro li ricevos sian porcion. Sed mi ne timas. Eĉ se mi ne manĝas homojn, tamen mi estas pli kuraĝa ol ili. Mi etendis ambaŭ miajn pugnojn. Mi vidos, kion ili faros kun mi ! La maljunulo eksidis. Por kelka tempo li jen palpadis jen meditadis kun fermitaj okuloj. Poste li malfermis siajn diablajn okuloj kaj diris :

A.- *Ne pensaĉu. Fariĝos bone post kelktaga ripozo.*

Cl.- *Ne pensaĉu ! Kelktaga ripozo ? Fi, certe ili havos pli multe por manĝi post kiam mi grasiĝos ! Nu, kia bono estos por mi, ke al mi fariĝos **bone**? ili volas manĝi homon, sed ĉiamaniere klopodas maski sian malnoblan intencon, ĉar ili ne kuraĝas fari malkaŝe – vere ridinde ! Mi eksplodis per neretenebla ridego kaj tre ĝojis ! Mi kredas, ke en mia rido troviĝas kavalireco kaj praveco. Superregitaj de miaj kuraĝo kaj ptraveco, la maljunulo kaj mia frato paliĝis. [...]*

A.- *La maljunulo eliris el mia ĉambro. Li ankoraŭ ne iris malproksimen kaj jam flustris al mia frato :*

Cl.- *Tuj manĝu !*

A.- *Mia frato kapjesis. Ha, ankaŭ vi! Kvankam ĉi tiu malkovro estis neatendita, tamen komprenebla. Fi, mia frato mem organizas la amason por buĉi min!*

Cl.- *Hommanĝanto estas mia frato!*

A.- *Mi mem estas frato de hommanĝanto !*

Cl.- *Mi estas manĝota de homoj, sed mi restas samtempe la frato de hommanĝulo ! [...]*

A.- *Nun mi divenis, kian metodon ili uzas. Ili ne volas kaj ankaŭ ne kuraĝas buĉi min malkaŝe, timante ke ia malfeliĉo okazos al ili. Ili komplotis kaj simple sternas retojn ĉie, por ke mi mem mortigu min. [...] Al ili estus la plej ideala solvo, se mi pendigus min per zono sur trabo. Tiukaze ili estos senkulpaj pri murdo kaj tamen ricevos, kion ili deziras. [...]*

Cl.- *Vi aŭdis prelegon el Svislando. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond legis al vieron el novelo de Lusin, ĉina verkisto. Ĝis reaŭdo!*